

# Kostenloser Esperanto-Kurs - 9. Lektion

## 1. KLARA MONOLOGAS

Ĉu vi antaŭ nia interkonatiĝo (inter-kon-at-iĝ-o) en la parko vere neniam aŭdis pri Esperanto, Peter? Ĝi ekzistas jam ekde pli ol cent jaroj, kaj hodiaŭ parolas ĝin inter centmil kaj du milionoj da homoj sur ĉiuj kontinentoj: unue en Eŭropo, poste en Azio kaj Ameriko, kaj hodiaŭ ankaŭ en Aŭstralio kaj Afriko! Mi proponas, ke vi partoprenu kun mi la sekvan Internacian Junularan Kongreson. Tie ni travivos kelkajn entuziasmigajn tagojn, kaj vi vidos, ke Esperanto estas eĉ pli ol nura lingvo. Ĝi estas amikeco inter la homoj, ĝi estas sento de komuneco. Tiun ĉi komunan senton oni nomas esperantismo. La homaro povus interrilati multoble pli harmonie, se ĉiu povus paroli unu komunan lingvon kiel duan lingvon apud sia gepatra lingvo. Nur proksimume unu kvinono el mia iama klaso en la lernejo sufiĉe bone parolas fremdan lingvon, ĉiuj aliaj bezonas tradukistojn dum siaj vojaĝoj aŭ tute ne povus interparoli kun eksterlandanoj.



Tiel pensis ankaŭ la kreinto de Esperanto, Ludoviko Lazaro Zamenhof. Laŭ profesio li estis okulkuracisto, li estis judo kaj vivis unue en Bjalistoko kaj poste en Varsovio, en la tiama Rusujo, hodiaŭ Polujo. En lia hejmurbo loĝis diversnaciaj homoj, ofte malpaciĝeme. Jam kiel knabo, Zamenhof promesis al si ŝanĝi tiun ĉi situacion. Li pensis, ke, kreante unu lingvon por ĉiuj, li povas servi al pacama mondo. Tiel naskiĝis la esperantismo, kaj pro tio Zamenhof ne nur elpensis saĝajn gramatikajn regulojn kaj utilajn vortojn, sed ankaŭ multe vojaĝis kaj per kortuŝaj paroladoj klopodis ligi sian lingvon kun la amo inter la homoj. Tion li opiniis tasko de sia vivo. Al mi plej plaĉas frazo, kiun li diris dum la unua Universala Kongreso de Esperanto en 1905 en la franca urbo Boulogne-sur-Mer:

*„Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Marŝo kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj.“*

## 2. NEUE WÖRTER

Diese Wörter erklären sich sicher selbst:

monologo, miliono, kontinento, Eŭropo, Azio, Ameriko, Aŭstralio, Afriko, harmonie, situacio.

Bjalistoko	Bialystok (Stadt in Polen)	multoble	mehrfach, um ein Vielfaches
esperantismo	„Esperantismus“ (ideeller Anspruch der Esperanto-Bewegung)	nacio	Nation
gepatra lingvo	Muttersprache	neniam	nie, niemals
gramatiko	Grammatik	okulo	Auge
homaro	Menschheit	opinii	(die) Meinung haben, meinen;
iam	irgendwann, einst	paco	Frieden
iama	ehemalig, einstig	profesio	Beruf
interkonatiĝi	Bekanntschaft schließen	proksimume	ungefähr, annähernd
interkonatiĝo	Bekanntschaft	promesi	versprechen
interrilati	miteinander umgehen	regulo	Regel
judo	Jude	rilato	Beziehung
klopodi	sich bemühen	Rusio	Russland
kortuŝa	herzergreifend, anrührend	ŝanĝi	(ver-)ändern
krei	schaffen, zeugen	sento	Gefühl
kreinto	Schöpfer; Autor; Erzeuger	servi	dienen
kuraci	heilen	tasko	Aufgabe
kuracisto	Arzt	tiama	damalig; zu jener Zeit
kvinono	ein Fünftel	travivi	erleben
laŭ profesio	von Beruf	tuŝi	berühren
malpaciĝeme	unfriedlich, streitsüchtig	universala	universell; Welt-, weltumfassend
morti	sterben	utila	nützlich
		vere	wirklich, wahrhaftig

### 3. GRAMMATIK

#### 3.1. Imperativ in einem Nebensatz, der mit „ke“ eingeleitet wird:

Li diris, **ke** ŝi venu en la ĉambron. - Er sagte, sie soll in das Zimmer kommen.

Mi proponas, **ke** vi partoprenu la renkontiĝon. - Ich schlage vor, dass du an dem Treffen teilnimmst.

La historio decidis, **ke** li mortu dum la milito. - Die Geschichte entschied, dass er während des Krieges sterben sollte.

In diesen Fällen wird durch die Imperativendung **-u** dem formulierten Wunsch, der Entscheidung oder der Anordnung deutlicher Nachdruck verliehen (häufig übersetzbar mit „sollen“).

Natürlich könnte der Imperativ in diesen Sätzen auch durch Modalverben oder einfach andere Form des Verbs ersetzt werden. Dadurch würde aber der Satzinhalt neutraler, emotionsloser zum Ausdruck gebracht. Zum Vergleich:

Li diris, ke ŝi povas veni. - Er sagte, dass sie kommen kann.

Li diris, ke ŝi venu. - Er sagte, dass sie kommen soll. (Er sagte, sie soll kommen.)

#### 3.2. Die Verwendung des Akkusativs

Die Verwendung des Akkusativs kann helfen, Sätze zu verkürzen und damit übersichtlicher zu gestalten. Oft ist es möglich, den Präpositiv indirekter Objekte zu direkten Objekten zu verkürzen. Nicht selten klingt das in deutschen Ohren seltsam, ist jedoch im Esperanto völlig legitim:

Mi partoprenas **en** la aranĝo. - Mi partoprenas la aranĝon. (Ich nehme an der Veranstaltung teil.)

Mi dankas **al** vi. - Mi dankas vin. (Ich danke dir.)

Mi gratulas **al** vi. - Mi gratulas vin. (Ich gratuliere dir.)

Ili sekvis **post** ŝi (oder: al ŝi). - Ili sekvis ŝin. (Sie folgten ihr. Sie folgten ihr nach.)

Wichtig ist, dass ein Verb **nicht zwei direkte Objekte** haben darf.

#### 3.3. Das Prädikativum

Es gibt im Esperanto (wie im Deutschen) Sätze, in denen scheinbar zwei Satzglieder im Nominativ (wer-Fall) stehen:

Paŭl estas instruisto. - Paul ist Lehrer.

Da wir aus der 1. Lektion wissen, dass der Nominativ stets das Satzsubjekt bezeichnet (Paul), wird das andere Satzglied (instruisto) als Teil des Prädikates (estas instruisto) betrachtet. Das Wort „instruisto“ wird daher als Prädikativum bezeichnet. In der modernen Literatur des Esperanto werden prädikative Formen gern benutzt und auf eine ganze Reihe von Verben ausgedehnt:

Li ŝajnas granda. - Er erscheint groß.

Li ŝajnas esti la plej alta. - Er scheint der Größte zu sein.

Ŝi sentas sin estrino de la grupo. - Sie fühlt sich als Chefin der Gruppe.

Mi opinias la filmon bona. - Ich halte den Film für gut.

Diese im Deutschen ungewöhnlichen Formen können im Esperanto natürlich auch umschrieben werden, durch Teilsätze oder durch das Wörtchen „kiel“:

Ŝi sentas sin kiel la estrino de la grupo.

Mi opinias ke la filmo estas bona.

Die Verwendung prädikativer Formen hilft, die Sprache rationell und eleganter zu verwenden.

### 3.4. Wortbildung

Suffixe:

- -ism- (Lehre, Ideologie):
  - katolikismo
  - komunismo
  - esperantismo
- -obl- (das Vielfache einer Menge; -fach):
  - duoble (zweifach)
  - la duoblo (das Doppelte)
  - trioble kvar estas dek du (drei mal vier ist zwölf)
- -on- (der Bruchteil einer Menge)
  - la duono (die Hälfte),
  - kvin sesonoj (fünf Sechstel)
- -um- (wird verwendet, wenn keiner der anderen Suffixe Verwendung finden kann; -um- ist ohne feste eigene Bedeutung), z.B.:
  - aero (Luft) - aerumi (lüften)
  - proksima (nah) - proksimume (annähernd)
  - kolo (Hals) - kolumo (Kragen)
  - plena (voll) - plenumi (erfüllen)

Oft muss die Bedeutung der durch -um- gebildeten Wörter speziell gelernt werden, da sie vom Wortstamm nur schwer ableitbar ist.

Hier noch die weitere wichtige Affixe, die bisher noch nicht in den Texten erschienen sind:

### Präfix:

- mis- (falsch, irrtümlich, miss-): **mis**kompreni (missverstehen), **mis**uzi (missbrauchen)

### Suffixe:

- -aĉ- (verächtliche Bezeichnung, häßlich): hunda**aĉo** (Köter), rida**aĉi** (verächtlich lachen)
- -end- (Tätigkeit, die noch zu erledigen ist): skrib**enda** letero (ein zu schreibender Brief), fare**ndaĵoj** (die noch zu erledigenden Dinge)
- -er- (Bestandteil): pan**ero** (Brotkrümel), program**ero** (Programmpunkt)
- -ing- (Halter, Hülse): kandelo (Kerze) - kandel**ingo** (Kerzenhalter), glavo (Schwert) - glav**ingo** (Schwertscheide)
- -uj- (Behältnis; Baum): paper**ujo** (Papierkorb; Behälter mit Papier), pan**ujo** (Brotkorb), pom**ujo** (Apfelbaum), ĉerizo (Kirsche) - ĉeriz**ujo** (Kirschbaum).  
Anstelle von pomujo, ĉerizujo usw. werden im modernen Esperanto (der Eindeutigkeit halber) häufig die zusammengesetzten Wörter pomarbo (pom-arb-o), ĉerizarbo (ĉeriz-arb-o) usw. benutzt.
- -ĉj- männliche Koseform: patro - paĉ**jo** (Papa, Papi), Josef - Joĉ**jo** (Jupp)
- -nj- weibliche Koseform: patrino - pan**jo** (Mama, Mutti), Maria - Man**jo** (Mariechen)

## 4. ÜBUNGEN ZU DEN AFFIXEN

### 4.1. Übersetze mit Hilfe von Vor- oder Nachsilben:

1. das Vierfache:
2. noch zu lesendes Buch:
3. ein Drittel:
4. Kuchenkrümel (von: kuko):
5. zwei Fünftel:
6. tratschen (von: paroli):
7. fehlleiten (von: gvidi):
8. Geldbörse (von: mono):

### 4.2. Übertrage die folgende Wörter ins Deutsche

Versuche dabei, möglichst treffende Begriffe oder Umschreibungen zu finden!

- |           |              |
|-----------|--------------|
| 1. ujeto  | 5. eksigenda |
| 2. arano  | 6. fiega     |
| 3. aĉaĵo  | 7. etiĝi     |
| 4. disigi | 8. estrino   |

## 5. PLANOJ...

- Nu, Peter, ĉu mi sukcesis fari la internacian Esperanto-kongreson interesa por vi? Ĉu vi akompanos min en la sekva somero?

Peter ankoraŭ ne findecidis (fin-decid-is).

- Mi ja intencis ferii vintre, eble januare aŭ februare. Vi scias, ke mi volonte okupiĝas pri vintra sporto!
- Tion vi ankaŭ povos fari. La kongresoj daŭras nur iom pli ol unu semajno, tiel ke restos al vi ankoraŭ tri semajnoj da ferioj. Krome: Komparu vian vintran feriadon kun internacia kongreso! En la montaro vi estos sola kaj malvarmumos, sed dum la kongreso vi estos kune kun centoj da novaj amikoj el dekoj da landoj. Kaj tio estas ne iu seka kongreso, sed kultura festivalo kun multaj interesaj kaj gajaj programeroj!
- Kara Klanjo, unue, dum vintra feriado mi nek estas sola, nek malvarmumas, kaj due, mi ne sufiĉe bone komprenas Esperanton.
- En la sekva somero vi komprenos. Tion mi promesas al vi, Peĉjo.
- La venonta kongreso okazos en suda ameriko, ĉu ne? Nu, certe mi ĉiam volis vojaĝi tien. Sed pensu pri la mono...

Sonoras. Envenas Eva, amikino de Klara. Ili salutas unu la alian, kaj Peter diras:

- Mi volas inviti vin al promenado en la urbocentron. Hodiaŭ estas tiel bona vetero, ke estus domaĝe sidi hejme malantaŭ ŝlosita pordo. Ĉu mi ne pravas?
- Jes, vi pravas. Ĉu vi jam konas la plej novan novaĵon? Permesu prezenti al vi nian akompananton por la Internacia Junulara Kongreso. Jen li staras!

Eva rigardas Peter, ridetante (rid-et-ant-e).

- Tio estas vere bona novaĵo!

Peter provas protesti.

- Sed mi nenion promesis! Ĉu vi ne unue volas mian opinion pri tio?

Sed ambaŭ knabinoj enkape (en-kap-e) jam preparas la vojaĝon:

- Ĉar la kongreso okazos en suda ameriko, ni vojaĝos unue per trajno, kaj trans la oceanon ni veturos per grandega ŝipo. Ni dormos unue en dormvagono, kaj poste en la malsupra etaĝo de la ŝipo. Tiel vojaĝi jam delonge estis mia revo!
- Ne, ni ne havos tiom da tempo. Ni flugos ...

Peter silentigas ilin:

- Mi proponas, ke ni nun ekiru al nia promenado. Ĉar hodiaŭ estas blua ĉielo, ni povus veturi al la televida turo kaj supreniĝi (supr-e-n-iĝ-i), kaj tie, en la kafejo, ni trankvile priparolos la aferojn de la vojaĝo. Ek!

## 6. NEUE WÖRTER

Erschließe Dir selber: sporto, festivalo, protesti, oceano, vagono.

ĉielo	Himmel	revo	Traum (nicht im Schlaf)
domaĝe	schade	ŝipo	Schiff
etaĝo	Etage	ŝlosi	verschließen
ferio	Ferien	sonĝo	Traum (im Schlaf)
flugi	fliegen	sonori	klingeln
montaro	Gebirge	televido	Fernsehen
monto	Berg	vintro	Winter
provi	versuchen		

### Lösungen zu 4.

#### 4.1

- |             |                  |           |                |
|-------------|------------------|-----------|----------------|
| 1. kvaroblo | 2. legenda libro | 3. triono | 4. kukereto    |
|             |                  |           | 5. du kvinonoj |

#### 4.2

- |                    |                                  |                             |
|--------------------|----------------------------------|-----------------------------|
| 1. kleines Gefäß   | 4. scheiden, auseinander bringen | 6. total verdorben/schlecht |
| 2. Mitglied        | 5. rauszuwerfend                 | 7. klein werden             |
| 3. hässliches Ding |                                  | 8. Leiterin                 |

## 7. KONTROLLÜBUNGEN

### 7.1. Erkläre nachfolgende Wörter auf Esperanto!

Beispiel: panujo: Tio estas ujo, en kiu estas pano.

1. paperujo -
2. hundaĉo -
3. programero -
4. sonorilo -
5. besteto -
6. taskaro -
7. saĝulo -
8. kuracilo -

### 7.2. Setze die fehlenden Endungen ein!

1. Mi proponas, ke vi nun ir\_\_\_ hejmen!
2. Li decidis, ke ŝi enven\_\_\_ en la ĉambron.
3. Paul ŝajnas esti la plej malalt\_\_\_.
4. Ĉu vi opinias la teatraĵon interes\_\_\_?
5. Ili sentis sin lac\_\_\_.

### 7.3. Schreibe einem Freund einen Brief über deinen bevorstehenden Urlaub!

Beachte dabei die Briefform (Anrede, Datum, Verabschiedung) und nutze dazu die folgenden Fragen:

- Kiam vi intencas ferii?
- Kien vi veturos? Ĉu la unuan fojon tien?
- Kun kiu vi pasigos la feriojn?
- Kion vi planas fari dum la feriaj tagoj?
- Kiom da tagoj vi restos?
- Pri kio vi okupiĝas vespere?